



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

Senlime

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.orgJ.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,
BE-4800 VERVIERS**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.orgP.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.orgK. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe**www.senlime.org**Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 3 EUR****Jara abono : 10 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.Ek de 2008, la kotizo (nedevisa sed
bonvenigata) estas disigita de la
abono al la papera versio de tiu-ĉi
informilo (kompreneble agenda).

ENHAVO

p. 2 : Eŭregiona kalendaro de *Senlime* 2008 (2/2)p. 3 : **Niaj programoj lupee :**

- Limburga duklando
- Kastelo de Maulnes
- Planedoj kaj steloj per komputilo

p. 4 : Oficiala prezento de la **nova KD de Jacques Yvart**p. 5 : Pri «*Eldorado*» kaj la orserĉado en Orientaj kantonjp. 6 : **Novaj kursoj** de E.G.V. (por komencantoj) en Verviers**Nouveaux cours pour débutants à Verviers**

**« Il existe une chose plus puissante que
toutes les armées du monde,
c'est une idée dont l'heure est venue. »**

**« Ekzistas io pli potenca ol
ĉiuj armeoj de l'mondo,
tio estas ideo kies horo alvenis. »**

VICTOR HUGO

ESPERANTO

★Universala lingvo

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2008 (2/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).

09-19 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Limburga Duklando**" (prelego de M. Schrymecker).
Inf. M. Schrymecker.

10-17 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Kastelo de Maulnes**" (prelego de Klaus Hogen).
Inf. hogen@senlime.org

11-21 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Planedoj kaj steloj per komputilo**" (prelego de Didier Lousberg).
Inf. lousberg@senlime.org

12-14 11h30 BE-Kelmis, Select : Zamenhof-festo (100a datreveno de Amikejo).
Inf. jacques@senlime.org

12-30 BE-Kelmis, kadre de **Internacia Festivalo** de Düsseldorf, tuttaga ekskurso al nia regiono: manĝo en Select kaj vizito de iama Amikejo (horo jam ne konata).
www.internacia-festivalo.de
Inf. HDP@internacia-festivalo.de



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la : **01-16, 02-20** (Ĝenerala asembleo), **03-20, 04-17, 05-15** kaj **06-19** (Karaoke).

19-09 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Le Duché de Limbourg**" (conférence de M. Schrymecker).

17-10 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Le Château de Maulnes**" (conférence de Klaus Hogen).
Inf. hogen@senlime.org

21-11 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Planètes et étoiles par l'ordinateur**" (conférence de Didier Lousberg).
Inf. lousberg@senlime.org

14-12 11h30 BE-Kelmis, Sélect : **fête Zamenhof** (100e anniversaire d'Amikejo).
Inf. jacques@senlime.org

30-12 BE-Kelmis, accueil des participants au **Festival International** de Düsseldorf, (excursion vers notre région): repas au Sélect et visite des vestiges de l'Amikejo (heure à préciser).

www.internacia-festivalo.de
Inf. HDP@internacia-festivalo.de



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **16-01, 20-02** (assemblée générale), **20-03, 17-04, 15-05** et **19-06** (karaoké).



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Limburga duklando

Jam de 1033, kastelo superstaris la valon de Dolhain/Limbourg (BE). Waleran-Udon akiris tiun lokon kaj tie konstruis potencan burgon kiu laŭlonge de la sekvontaj jarcentoj konos longan serion da ruinigoj, bruligoj kaj rekonstruoj.

La graflando de Limburgo, kiu iĝis duklando komence de la 11a jarcento, pli-malpli etendiĝis norde de la urbo Limbourg, inter Mozo kaj Akeno. Ĝi entenis 43 vilaĝojn en la grundo de Limbourg, la komunumojn Baelen, Herve, Montzen (inluzive de la nunaj Kelmis/Amikejo), Walhorn kaj la sep vasalajn landetojn diritajn «transe de la arbaroj». Tiuj sinjorlandetoj, kiuj konsistigis enklavon en la Lieĝa Princlando, estis Sprimont, Esneux, Tavier, Villers-aux-Tours, La Chapelle, La Rimièr kaj Bagnée.

Le titolo **ĉefurbo de la duklando** kaj la sekura rifuĝo kiun certigas fortikaĵo laŭdire neprenebla, la ardo de la dukoj, kaj la senfinaj konfliktoj de la mezepoko kostos al la urbo multnombrajn sieĝojn : de Henriko la 4a el Germanio en 1101, la princoj de Oranĝo en 1577, Aleksandro Farnese en 1578, la princo de Konde en 1675 kaj la duko de Malbruk en 1703.

De 1839 ĝis 1906, la nederlanda provinco Limburgo ankaŭ nomiĝis *Limburga duklando* kiel membro de la ĝermana Konfederacio.

09-19 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Limburga Duklando**".
Inf. M. Schrymecker, prelegonto.

Kastelo de Maulnes

Situanta lime de la regiono Yonne (FR) sur la teritorio de la urbo Cruzy-le-Châtel, ne fore de Tonnerre, Tanlay kaj Ancy-le-Franc, la kastelo de Maulnes estas ununura monumento en Francio pro ĝia kvinangula plano, centrigita chirkaŭ ŝtuparo-puto. Tiu renesanca kastelo estas konstruita dum la dua duono de la 16a jarcento de influaj komanditantoj.

Ĝi estis diversamaniere utiligita tra la jarcentoj sed malgraŭ la difektoj kaŭzita de la homoj kaj de la tempo, ĝi konservis parton da mistero kaj da poezio kiu hodiaŭ plu nutras nian imagpovon. Tiel Charles MOISET publikigis en sia verko «Usages, croyances, traditions, superstitions de l'Yonne» [kutimoj, kredoj, tradicioj, superstiĉoj de Yonne] du rakontojn pri la feino Melusina okazintaj en la kastelo.

Tiu-ĉi iĝis proprieto de la Departemento kiu tuj entreprenis la necesajn arkeologiajn kaj historiajn serĉojn necesajn por gvidi la restaŭradon.

Tiu-ĉi komenciĝis per la sekurigo de vizit-rondo kiu ebligas malfermi la kastelon por la publiko dum la laboroj. Ĝi daŭras per la restaŭrado de la komuna konsruaĵo kaj per tiu de la fasadoj, plankoj kaj tegmentoj de la loĝejo.

10-17 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Kastelo de Maulnes**" (prelego de Klaus Hogen).
Inf. hogen@senlime.org

Planedoj k. steloj per komputilo

Por la astronomo, ne gravas ĉu profesia aŭ amatora, pro la apero de la aŭtomataj muntumoj kaj de la kameraoj kun CCD-kaptiloj, la informadikaj softvaroj iĝas pli gravaj ol la observiloj mem.

La softvaroj pri ĉiela kartografio kaj virtuala planetario enhavas datumaron uzitan por ebligi la necesajn kalkulojn antaŭ la afiŝado sur la ekrano de la diversaj ĉielaj objektoj. Per kelkaj el tiuj softvaroj, eĉ eblas de fore piloti tutan observejon (kameraon kaj kupolon).

Uzo de softvaro ankaŭ necesas por prizorgi la astronomiajn bildojn. Ili povas substreki detalojn kajkunigi bildojn post la traktado (la observiloj ne havas sufiĉan vidkampon por komplete foti vastan astron). Suplementa funkcio ebligas kunmeti bildojn el ĉiuj koloroj (la observiloj ofte estas unukoloraj), kion oni nomas "kompozitado".

Aliaj softvaroj estas uzitaj por koncepti observilojn (teleskopoj, ...).

Informadik-ŝatantoj volonte uzos eksterteran-flugsimulilon kiel ORBITER. Sed atentu, tute ne temas pri pafludo! La softvaro klare celas realismon kaj lernadon (de astronomiaj kaj mekanikaj bazoj).

11-21 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Planedoj kaj steloj per komputilo**" (prelego de Didier Lousberg).
Inf. lousberg@senlime.org

Jacques YVART

prezentis sian novan diskon en esperanto : *Invito por Vojaĝo*

Nia amiko Mike (Wahagnies, Francujo) verkis raporton pri la festo por la lanĉo de la nova albumo de Jacques Yvart (tute kantita en esperanto), okazinta sabaton la 19an de aprilo 2008, en la Kulturdomo de Rosendaël. Li unuafoje partoprenis esperantan renkontiĝon kaj li raportas per novaj okuloj kaj oreloj...

Proksimume cent personoj partoprenis la feston en la granda kaj bela lignpanela salono ĉe la teretaĝo en la "Kasteleto Coquelle", kie eta scenejo estis instalita kaj sonekipita.

Post bonvenigaj paroladoj de S-ino Claudine Hivin, Direktorino de la Kulturdomo kaj de Jacques Yvart mem, la mikrofonon prenis S-ro Xavier Vilain por prezenti "Dunkirko - Esperanto" Asocion, kies prezidanto li estas.

La sekva oratoro venis speciale el Tuluzo, en suda Francio, por reprezenti la Asocion "Eŭrokka" kaj "Vinilkosmo"-n, la diskeldonejo kiu produktis la KD-on : S-ro Floréal Martorell, pli konata ĉe Ipernity sub la nomo Flo (de Vinilkosmo)...

Finfine alvenis la longatendita momento: Jacques Yvart prezentis siajn du kunmuzikistojn (Sarah ĉe violono kaj Alex ĉe basgitaro) kaj prenis sian gitaron... Tre facile, Jacques Yvart konkeris sian publikon ekde la unua kanzono "**En la Valo de l'Rozoj**", kiu kortuŝante aludas al sia infaneco en Rosendaël - sia naskiĝa vilaĝo, nun parto de la urbego Dunkerque.

*"Naskiĝis tie mi, plukreskis tie mi.
La maro en proksim' lulis ondojn
kun kant'.*

*En dimanĉ' trinkis ni limonadon
Primrozo,
En la Valo de l'Rozoj - En la Valo
de l'Rozoj."*

NB : Rosendaël estas la flandra traduko de "la Valo de l' Rozoj" - en la franca "La Vallée des Roses".

La sekva nova kanzono, kiun li interpretis, memoras sian unuan albumon "**Jacques Yvart kantas Brassens**", ĉar denove temas pri famkonata kanzono de la repertuaro de Georges Brassens. La originala teksto estis poemo de Paul Fort " Le Petit Cheval", esperante : "**La Ĉevaleto**". Grandan sukceson Jacques denove ricevis, des pli ke la tuta publiko jam konas tre bone la melodion... kaj la basa voĉo de la kantisto vere similas tiun de Brassens!

*"Ĉevalet' tra la pluva mond'
Besto blanka kun kuraĝo
Ĝi galopis al horizont'
Ni nur sekvis, ni nur sekvis..."*

La trian kaj lastan kanzonon, kiun Jacques Yvart interpretis antaŭ lia kontentiga publiko, li verkis kaj komponis mem... Dunkerque estas haveno kaj, kompreneble, la maro havas egan gravecon en la vivo de la urbanaro... Kiel mi skribis jam antaŭe, Jacques Yvart naskiĝis en Rosendaël, nun parto de Dunkerque; la ŝipojn, kiujn li ĉiam vidis dum sia infaneco, certe instigis lian deziron por vojaĝoj...

*"Diru bela ŝipo
Estras kies skipo
Kia estas cia flag'
Se ĝi ruĝ' kaj nigras
Kune ni formigras
Al la horizontovag'
Oe oe oe oe oe
oe oe en la ŝipo!"*

Post la lasta kanzono, Jacques Yvart elkore dankis la tutan ĉeestantaron kaj invitis por paroladi la deputiton-urbestron, S-ro Michel Delbarre. La eksministro laŭdis sian "amikon Jacques" nomanta lin "heroldo de pacmesaĝoj". Li ankaŭ diris, ke ofte li renkontis deputitojn de aliaj landoj de la EU kaj rimarkis, ke *estus pli facile komuniki per esperanto, sed bedaŭrinde multaj tradukistoj kaj interpretistoj do estus senlaboraj...*

La kantisto trandonis al li sian novan KD-on, kiu estas lia dua en Esperanto ... sed jam la 26-a disko de lia jam longa kariero!



Jacques Yvart

Post la eta koncerto, ĉiuj estis invititaj al la "honorvino" preparita de la anoj de la Kulturdomo kaj de la Asocio "Dunkerque-Esperanto" ...

Jacques Yvart tre volonte kaj amike subskribis personajn dediĉojn ... kaj Flo estis tre okupata, ĉar multaj personoj deziris aĉeti la novan diskon!

El Ipernitio, de Mike

Orientaj kantonoj de Belgio, ĉu «*Eldorado*» ?



Buli Lanners (dekstre)
en lia filmo "Eldorado"

Vere, la orientaj kantoj de Belgio, al kiuj apartenas Kelmis/Amikejo ne nur allogas Nederlandajn turistojn. Pluraj filmistoj efektive elektis tiun regionon por realigi siajn verkojn. **Eldorado**, la lasta verko de Buli Lanners, filmisto naskiĝinta Moresnet (Amikejo), estas filmita en la regiono de Sourbrodt, 30 km sude de Kelmis.

En Cannes, okaze de la "Duonmonato de la Realigistoj", Buli Lanners ricevis tri premiojn pro "Eldorado" : la Premio "Label Europa Cinémas" (atribuita al la plej bona eŭropa filmo de jurio komponita de kinejaj ekspluatantoj), le Premio "Regards jeunes" (atribuita de kinemaj junuloj) kaj la Premio de la Federacio internacia de la kinarta gazetaro (Fipresci).

Virgajn dekorajn, vojojn traŭrantaj naturon krudan : Buli trovis, kerne de la Altaj Marĉoj, la idealan pejzaĝon pro lia tute nekutima filmo, kiu kvazaŭomaĝe al la usona kinarto (road-movie kaj buddy-movie) promenas nin tra ardenaj teroj similaj al la Granda Nordo... malfeliĉe postlasante al

eksterlandanoj bildon grizan kaj malĝojan pri nia lando, malgraŭ la ege simpatia mieno (preskaŭ tipe esperantista - kvankam li ne estas samideano nia) de Buli, kiu mem ĉefrolas en la filmo...

Tamen, jes ja nia lando estas Eldorado... jam antaŭ 2500 jaroj, Keltoj trovis oron en la regiono, kiel atestas multnombraj amasoj da orlavad-restaĵoj borde de multaj el niaj rojoj. Oni eĉ diras ke la romianoj invadis la landon pro ŝato ne al konkero sed al oro : estis, por tiel diri, «kurego al oro».

Sed kompreneble okazis poste aliaj. Ekzemple, en 1802, najbaroj de la rojo Chefna, proksime de Aywaille, sekrete ekserchis bonan minvejon. Surloke, atestas pri la ekzisto de iamaj mingalerioj nur la restaĵoj de du arkoj. Oni scias ke proksime, en Martinrive, oni sukcesis havigi al si 0,05 gramoj da oro por tuno da lavita gruzo. Eblis tiel iĝi milionulo...

La sekreto iom post iom estis malkovrita kaj ek de 1875 okazis nova kurego al oro en la regiono.

Tion rakontas **alia filmo samtitola** (Eldorado) filmita en Sougne-Remouchamps.

De la jaro 2000 ĝis nun, ĉiujare orserĉantoj plukunvenis en Faymonville (apud Sourbrodt) por trovi oron...

Pri kinarto kaj Buli, ni rakontis en antaŭa informilo pri la apero de stiu lasta kun alia belgo, Benoît Poelvoorde, en "**Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludo**". Se Buli unue realigis etajn filmojn kaj dokumentojn, kies unua nomiĝis "**Ne, Valonujo, via kulturo ne forpasis**", lia unua longdaŭra filmo (selektita por la filmfestivalo en Berlino) estis "**UltraNova**" (2005).

Aliaj filmoj devenas de nia regiono. Tiel, en oktobro 2007, la francaj geaktoroj C. Bouquet kaj G. Depardieu rolludis en «Les Enfants de Timpelbach» [**La infanoj de Timpelbach**], en la kastelo de Hergenrath (kelmis). Fine, militista kampo apuda (en Elsenborn) dekoris la filmon «Voleurs de chevaux» [**ŝtelistoj de ĉevaloj**] de la belga Micha Wald.

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**spéranto **G**rupo

Cours d'espéranto avec un GSM

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
dès aujourd'hui l'une des cotisations
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo
25 Rue Pierre Fluche

BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime**, restée
inchangée depuis sa création, est
maintenant facultative et laissée à
l'appréciation de chacun (mais
l'abonnement à ce bulletin en version
«papier» reste payant : 10 €).*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2008 (EGV) 14 €

U.E.A. 2008 (MA) 58 €

Senlime (abonnement) **10 €**

**en indiquant le nom du membre
cotisant, le bénéficiaire, l'année
«cotisation de pour».**

Les méthodes pour aborder l'espéranto en autodidacte (avec ou sans ordinateur et/ou internet) ne manquent pas. Certains hésitent pourtant à y recourir, regrettant à l'avance le manque de soutien du professeur et du groupe... Essayez donc le GSM (l'autre!).

Un **Groupe de Soutien Mutuel** se compose d'un professeur et de 5 élèves adultes (maximum) se réunissant périodiquement autour d'une table pour (s')assurer un soutien complémentaire dans l'apprentissage de l'espéranto.

Les élèves

- étudient la théorie à domicile avec le cours de leur choix⁽¹⁾
- répètent oralement à domicile les exercices systématiques (au moins 2 x 15 min. par jour, à l'aide d'enregistrements)
- participent régulièrement et activement à leur GSM.

Le professeur

- organise le cours (horaires,...) en fonction des désirs des élèves
- entretient la dynamique du groupe («coaching»)
- lance des activités complémentaires motivantes (jeu, karaoké,...)
- parle (et fait parler) en espéranto (conversations)
- corrige les fautes les plus graves (uniquement).

A Verviers, les GSM se tiennent une semaine sur deux le mardi soir (ou à un autre moment si une majorité de participants le demande), d'octobre à avril, au domicile d'un des participants.

Prix (12 x 2h) : 100 EUR payables pour moitié à l'inscription et pour moitié au 1^{er} janvier suivant (réduction de 20% aux jeunes de moins de 25 ans et aux personnes fournissant le local ou le «covoiturage»).

Renseignements complémentaires et formulaire d'inscription :

- écrire à J-M Jacques, rue Joseph Wauters 5, 4800 VERVIERS
- envoyer un SMS avec vos coordonnées au 0486/947.957
- envoyer un mél à : jacques@senlime.org
- consulter le site : <http://www.senlime.org>

Les GSM de Verviers ne s'adressent qu'aux débutants. Des stages résidentiels avec cours de perfectionnement sont organisés (en espéranto) dans des centres espérantistes comme le château de Grésillon (Beaugé, France), Herzberg am Harz (Allemagne), La Chaux-de-Fonds (Suisse), etc. Une semaine dans l'un de ces centres donne généralement les meilleurs résultats (et coûte nettement moins cher qu'une semaine au Céran !).

(1) Il est recommandé d'utiliser un cours moderne, de type audio-visuel : toute méthode axée sur l'apprentissage par l'écoute et la répétition (CD, cassettes,...) telle que l'assimil peut convenir. Le Groupe Espérantiste de Verviers peut éventuellement vous fournir son propre cours avec prêt de cassettes audio.